

BE

ISSN 0006-9477



99-a jaro
N-ro 331
Novembro 2007

Guimarães Rosa

**Ĉu Esperanto influis la
verkaron de la kreema
brazilano?**

Sizenando, la vivo estas trista

Rakonto de Rubem Braga

Machado de Assis

La malprobabla geniulo

Camões

Ĝentila amatino kara





POTENCIALIZAR
SERVIÇOS EM PSICOLOGIA

Avaliação de competências para diferentes funções

Avaliação de potencial para líderes

**Avaliação das capacidades intelectuais e
criativas de crianças e jovens**

Contato: 19-9235-7554/ ou wechsler@lexxa.com.br

Trabalhe dentro da Lei!

Realize periodicamente
controle de qualidade
e levantamento radiométrico;
testes de radiação de fuga em
equipamentos de raios X
(Consulte kerma)

Contato: 6958-3593

Legu, lernu kaj ĝuu

*Vortaroj enhavantaj nur taŭgajn vortojn meritas
esti legataj de la unua ĝis la lasta paĝo.*

En Dicionário do Pricipiante estas 1.200 tre uzataj radikoj plus 1.700 nepre uzindaj kunmetaĵoj kaj ankaŭ mallongigoj kaj ofte uzataj propraj nomoj.

En Originala Esperanta Bildvortaro estas 92 bildpaĝoj kun ĉirkaŭ 3.000 bildigitaj vortoj, facile troveblaj pere de alfabetaj kaj laŭtema vortolistoj.

bel-co@esperanto.org.br

Caixa Postal 03625 – CEP 70084-970 Brasília/DF – Tel. (61) 3226-1298



La fortaleza ondo revenas...

Ne maltrafu ĝin!

43-a Brazila Kongreso de Esperanto

27-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso

Fortaleza, de la 12-a ĝis la 16-a de Julio 2008

Kongresejo: Federacia Universitato de Cearao

<http://www.esperanto.org.br/43bke.htm>



Enhavo

04 Ĉefartikolo

05 Prezidanta Mesaĝo

06 Traduko: soneto de Camões

09 Eseo: Guimarães Rosa kaj Esperanto

12 Poezikkvizo: Taksu vian konon

14 Poemo: *Inania verba* (Vanaj vortoj)

15 Poemo: La Homoj; la Vojaĝoj

16 Rakonto: La Vitralo

17 Traduko: La Hirundoj de Campinas

18 Kroniko: Sizenando, la Vivo Estas Trista

19 Biografio: Machado de Assis – la Malprobabla Geniulo

20 Poemo: Ĉiaj Leteroj

21 Aliĝilo

22 Abonilo



Kovrilo

La plej fama poeto
en la portugala
lingvo, Luiz Vaz de
Camões



Pri la nuna numero

Portugallingva beletro en Esperanto

Tiu ĉi numero de Brazila Esperantisto estas dediĉita al la disvastigo de portugallingva beletro pere de la Internacia Lingvo.

Revukunlaboraĵoj: La ĉefredaktoro rigardas gravaj la kunlaboraĵojn sendatajn de la legantoj. Tamen, pro hommanko, spaclimigoj en la revuo, kaj kromaj limigoj, li rezervas al si la rajton: **1-e:** Ne sciigi la ricevon; **2-e:** Ne redoni la sendaĵojn; **3-e:** Ne garantii publikigon; **4-e:** Mallongigi tekston tiam, kiam necese; **5-e:** Ĝin reviziigi laŭ ortografia, gramatika kaj terminologia aspektoj. Kiel gramatikan konsultfonton ni rekomendas la verkon "Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko", de Bertilo Wennergren. La signifon de ĉiuj vortoj retroveblaj en "Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto" (2005) oni aparte klarigu per glosaro.

Anoncartarifo: Tabelo pri prezoj (Brazila Esperantisto) Onoj de paĝo (anoncoj)

● Komercaj markoj reproduktitaj celas nur ilustri kaj apartenas al la posedantoj

tutpaĝa (19x25cm)
4-a kovrilo R\$ 900,00 (kolora)
2-a kaj 3-a kovriloj R\$ 600,00
(nigra-blankaj)

1/2 duonpaĝa (9x24cm)
R\$ 450,00 (kolora)
R\$ 300,00 (nigra-blanka)

1/3 trionpaĝa horizontale
(8x18cm) R\$ 300,00 (kolora)
R\$ 200,00 (nigra-blanka)

1/3 trionpaĝa vertikale
(8x18cm) R\$ 300,00 (kolora)
R\$ 200,00 (nigra-blanka)

1/6 sesonpaĝa (7.8x8.8cm)
R\$ 150,00 (kolora)
R\$ 100,00 (nigra-blanka)

Estimataj gelegantoj:

En 2007 ni festas la centjariĝon de du eventoj speciale gravaj por la Esperanto-movado en Brazilo: la fondo de Brazila Esperanto-Ligo kaj unua numero de ĝia oficiala organo "Brazila Esperantisto". La unuan ni jam celebris dum la ĉi-jara Brazila Kongreso de Esperanto, okazinta en Rio-de-Ĵanejro. La duan ni celebras nun, per la reapero de nia revuo.

Por doni al ĉi tiu numero apartan karakteron, ni decidis fari ĝian enhavon ekskluzive beletra. Vi trovos ĉi tie tradukaĵojn de famaj portugallingvaj aŭtoroj, kaj denove eblos konstati, kiel belsona kaj rimedriĉa estas nia aminda kaj amata lingvo.

Post la grava mesaĝo de nia prezidanto, samideano José Passini, vi komencos agrablan vojaĝon tra beletra arbaro. Unue ni prezentas faman soneton de Camões, en kvin malsamaj tradukoj. Estos sendube interese kaj instrue kompari la malsamajn solvojn, kiujn ĉiu tradukinto uzis por esperantigi la tekston.

Sylla Chaves kaj la karmemora Leopoldo Knoedt kontribuas per siaj tradukoj de fama poemo de Raimundo Corrêa. Jen alia ŝanco, por ke vi komparu la solvojn aplikitajn de du kompetentaj tradukistoj.

Ĉu vi jam sciis, ke Guimarães Rosa scipovis Esperanton? Antaŭ ol ĉeesti prelegon de Aloisio Sartorato, mi mem nesciis tiun ĉi fakton. Lia artikolo, bazita sur la prelego, trafe pritraktas interesajn historiajn detalojn pri la esperantisteco de Rosa.

Post historio, venos momento por kultura amuzo. Cícero Gabriel provizas al ni ŝancon por testi nian scion pri Esperanta literaturo per poezikvizo. Testu kaj amuziĝu!

Geraldo Mattos sendis al ni tradukon de soneto de Olavo Bilac, premiitan ĉe la Belartaj Konkursoj de 1957.

Kaj nun ĝuu poemon de Carlos Drummond de Andrade en traduko de Aloisio Sartorato, verko temanta pri paca kunvivado kaj sekve intime ligita al la interna ideo de la Esperanto-movado.

Poste iru al rakonto de Osman Lins en traduko de Francisco Wechsler. Esperinde plezurigos la kristala simpleco kaj delikateco de tiu ĉi verko.

Sekvas kroniko de Rui Barbosa tradukita de Floriano Pessoa. Rimarku, kiel nia lingvo, per manoj de lerta tradukisto, sukcesas redoni la filigranajn nuancojn de la originalo.

Kaj jen alia kroniko, ĉi-foje de Rubem Braga, en traduko de Aloisio Sartorato. Ĉu vi konsentas, ke devas ekzisti ligiteco inter skoltismo, Esperanto kaj vekigi frue?

Artikolo de Paulo Sérgio Viana pritraktas la vivon kaj verkojn de Machado de Assis, brazila beletra geniulo, kiu fariĝis mondfama romanisto, spite al la baroj, kiujn lia vivo trudis.

Ni finas per vaste konata poemo de Humberto de Campos en traduko de Sylla Chaves.

Legu kaj ĝuu!

Francisco Stefano Wechsler

Redaktoro



Brazila Esperantisto

ISSN 0006-9477

Oficiala Organo de Brazila Esperanto-Ligo

Fondita en 1907 de Alberto A. Vieira, Reynaldo Geyer kaj Everardo Backheuser
99-a Jaro – Novembro 2007 – N-ro 331

Eldona Stabo

Ĉefredaktoro Francisco Stefano Wechsler

Konstantaj kunlaborantoj Paulo Sérgio Viana, Sylla Chaves, Aloisio Sartorato

Ĉi-numeraj kunlaborantoj Aloisio Sartorato, Paulo Sérgio Viana, Sylla Chaves,
Francisco Stefano Wechsler, Geraldo Mattos, Leopoldo Knoedt, Cícero Gabriel,
Carlos Domingos, Martins D'Almeida

Grafika aranĝo kaj enpaĝigo Joseo Tenorjo

Revizio kaj tradukado BEL-asesorskipo

Redakcio ĉe BEL-sidejo - Telefono: 55 (61) 226 9433

Pri la subskribitaj artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

Brazila Esperanto-Ligo

Fondita en 1907



Sidejo Ed. Venâncio III – Sala 301/303, Setor de Diversões Sul
Poŝtadreso Caixa Postal 03625, CEP 70084-970 Brasília – DF

Telefono (0xx61) 226 1298 Faksno (0xx61) 226 4446

Retadreso bel-co@esperanto.org.br Hejmpaĝo www.esperanto.org.br

Estraro

Prezidanto José Passini Vic-prezidanto Paulo Sérgio Viana

1-a Sekretario Carlos Maria 2-a Sekretario Francisco Stefano Wechsler

3-a Sekretario Alfredo Aragón Guerrero

1-a Kasisto João Osvaldo Pestana 2-a Kasisto Maria das Dores Góes

Kontrolo Konsilantaro

Aymoré Vaz Pinto, Eúripedes Alves Barbosa, Wilson Álvares de Oliveira, Aloisio Sartorato,

Célio Freitas Martins, Maurício Monken Gomes

Federacia Konsilantaro

Prezidanto Wandemberg Ribeiro Morais

Komitatano A kaj Ĉefdelegito de UEA
James Resende Pintom

José Passini

Estimataj Gesamideanoj,

En la nomo de la nova estraro de Brazila Esperanto-Ligo, mi dankas al ĉiuj, kiuj transdonis al ni la honorigan taskon daŭrigi la agadon de tiom da sindonaj kaj valoraj esperantistoj, kiuj ĝis nun subtenis alte kaj fiere nian verdan standardon.

Ni plene konscias, ke ni devas alfronti multon da obstakloj kaj malkomprenoj aperontaj sur nia vojo, sed tio ne timigas nin, ĉar ni fidas ne pri niaj fortoj, sed pri la forto de la nobleco kaj supereco de nia afero, kiu garantias ĝian pluvivadon, malgraŭ la malfacilaĵoj, kiuj kelkfoje aperas en nia anaro.

Nia devizo Paco kaj Kunlaboro ne estis elpensita nur celante belan kaj belsonan devizon. Ĝi respiegulas ardan decidon de grupo, kiu adoptis ĝin ne nur kiel standardon, sed intencas senlace labori favore al la idealo de Esperanto, ĉiam pensante pri la saĝaj vortoj de Zamenhof, eldiritaj en lia fama parolado dum la Universala Kongreso en Krakovo: Per unueco ni pli aŭ malpli frue nepre venkos, eĉ se la tuta mondo batalus kontraŭ ni; per interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide, ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune.

La saĝaj admonoj de Zamenhof ĉiam devas esti rememortaj, ĉar kie estos homoj, tie estos malegalaj opinioj, malgraŭ ke ili batalas favore al sama idealo. La Majstro ĉiam donis ekzemplojn de toleremo, ricevante la atakojn kun vera spirito de esperantismo, ĉiam konsilante pacon: Se en nia afero aperos io, kio ŝajnas al ni malbona, ni povas trankvile ĝin forigi per komune interkonsentita decido; sed ni neniam semu en nia tendaro reciprokan malamon kaj malpacon, kiu nur ĝojigas kaj triumfigas niajn malamikojn. En la unuaj jaroj de nia laborado sur nia standardo estis skribitaj la vortoj “espero, obstino kaj pacienco”; tio tute sufiĉis, ĉar ke ni, samideanoj, devas reciproke nin estimi kaj helpi, tio por ĉiu estis komprenebla per si mem. En la lastaj jaroj ni bedaŭrinde ofte forgesis

tiun devon; tial nun, transirante en la duan periodon de nia historio, en la duan kvaron-jarcenton, ni skribu sur nia standardo novan vorton, kaj ĉi tiun vorton ni ĉiam respektu kiel sanktan ordonon: tiu vorto estas “konkordo”.

Nun ni transiras en la duan jarcenton. Esperanto jam pruvis al ni esperantistoj sian plenan maturecon kiel vivanta lingvo. Sed la mondo ankoraŭ ne konsideras ĝin tia. Do nia tasko estas konservi ĝin per efektiva uzado ĝis la popoloj plene konscios, ke ili vere bezonas neŭtralan internacian lingvon. Ĝis tiam, nia fervoro devas zorgi pri la torĉo, kiu lumigos la interkomprenon de la Homaro.

Tiamaniere oni vidas, ke la tasko antaŭenigi Esperanton estas de ĉiuj esperantistoj. Ni devas uzi la lingvon ĉiam pli kaj pli, legante aŭ aŭdante ĝin ĉiutage. Ni devas entuziasme instrui ĝin, eĉ se al nur unu lernanto.

B r a z i l a
Esperanto-Ligo estas posedaĵo de ni ĉiuj. Do, ni devas zorgi pri ĝi. Varbu novajn anojn! Ene de tiu ĉi revuo vi trovos aliĝilon, kiun vi povos multoblige.

Elkorajn salutojn.
Antaŭen!

José Passini



Alma minha gentil, que te partiste tão cedo desta vida descontente, repousa no céu

amor ardente que já nos olhos meus tão puro viste. E se...

eternamente e viva eu, cá na terra, sempre triste. Se lá no

Alma Minha Gentil

Luiz Vaz de Camões
(1524? - 1580)

Tradukis: Martins d'Almeida

Ho, vi ĝentila amatino kara,
Vokita frue el la vivo tera,
Ripozu pace en ĉiel' mistera
Dum mi vivados en sufer' amara.

Se en loĝejo via anĝelara
Memor' prihoma estas ja libera,
Vi do memoru pri la amo vera
En mi brulanta pura kaj senbara.

Kaj se vi juĝas indaj je premio
La miajn sorton kaj ĉagrendoloron,
Kompate petu vi por mi al Dio,

Ke min li same donu la favoron
Forsendi ankaŭ min al la legio
En kiu vi nun ĝuas sanktan gloron.

assento etéreo, onde subiste, memória desta vida se consente, não te esqueças daquele



Ĝentila amatino kara

DOLÇA ANIMO MIA FORIRINTA*Tradukis Carlos Domingos*

Dolça animo mia, foririnta
el la vivo tre frue, nekontenta,
en la ĉiel' ripozu kaj, plorsenta,
vivas ankoraŭ mi malĝojĝinta.

Se en la lok' etera vin preninta
la permeso je pens' estas konsenta,
memoru pri la amo sentimenta
kiun en mi vi mem estis vidinta.

Kaj, se ion meritas la doloro
kiu, pro via bedaŭrinda fin'
restis en mia suferanta koro,

petu al Dio ke Li voku min
al via rigard' je tre frua horo
kiel tre frue Li alprenis vin.

ANIMO MIA DOLÇA FORIRINTA*Tradukis: Leopoldo H. Knoedt*

Animo mia dolça, foririnta
tro frue de ĉi vivo, malkontente
al la ripoz' eterna, mi lamente
nun vivu sur la tero, desperinta.

Se l' Seĝ' Etera, supren vin tirinta
permesas, rememoru reprezente
pri l' arda, pura amo, elokvente
en la rigardo mia aperinta.

Se pensas vi, ke povas nun validi
sensava vundo, kiu min ĉagrenis
dolore, ĉar vi devis forrapidi,

de Dio petu, kiu vin forprenis,
ke vin mi tiel frue povu vidi,
kiel li frue vin de mi fortendis.

ALMA MINHA GENTIL*Tradukis: Sylla Chaves*

Animo dolça mia, forfluginta
tro frue de ĉi tiu viv' sen cel',
ripozu vi por ĉiam en ĉiel',
dum mi sur tero restas, bedaŭrinda.

Se en ĉielo estas akceptinda
memoro pri ĉi tiu viv-malhel',
vi ne forgesu pri la puro de l'
amflamoj, kiujn estis vi vidinta.

Se mi meritas, ke vi provu plue
balzami ĉi solecon, tiun ĉi
doloron senkuracan, vi unue

petegu al burĝon-falĉinta Di',
ke li min sendu por vin vidi frue,
samkiel frue prenis vin de mi.

ĜENTILA ANIMO MIA*Tradukis: Geraldo Mattos*

Ĝentila animo mia, de la tero
malĝoje foririnta tiel frue,
ripozu en ĉielo tempoflue
kaj tie ĉi mi vivu en sufero.

Se nur en via sido el etero
pri vivo eblas rememori ĝue,
la amon ne forgesu, kiun skue
mi montris al vi en okulsincero.

Kaj se vi povos juĝi min merita
je iom da konsol' pro la dolor'
vin perdi en la disto infinita,

al Dio petu, vin preninta al glori,
min porti tiel frue el tero spita,
kiel li portis vin de mia kor'...

SEKRETA SUFERO

Raimundo Correia

Tradukis Leopoldo Knoedt

Se la kolero ŝaŭma, la doloro
anima, detruanta revon ĉian;
sufera vundo ĉia de la koro
stampus l' esprimon fizionomian;

se de l' spirito nevidebla ploro
transpasus la vizaĝon komedian,
kiom da enviitoj en ĉi horo
estigus eble nur kompaton nian!

Kiom da ridetuloj eble ene
kruelan malamikon portas trene,
simile al kaŝita vund' kancera!

Kiom da ridetuloj eble vivas,
kies feliĉon sole nur motivas
feliĉoŝajno al la mond' ekstera!



SEKRETA MALBONO

de Raimundo Correia

traduko de Sylla Chaves

Se la dolor' anima, l' iluzio
pro ĝi mortinta, la kolero' terura,
kaj ĉio, kio koron vundas, ĉio
aperus, kvazaŭ tra kristalo pura;

kaj se videbla estus l' agonio
spirita, tra l' vizaĝa mask' ebura,
tre multaj homoj, kaŭzoj de envio,
fariĝus kaŭzoj de kompatato nura.

Ho, kiel multe da ridantoj devas
al ĉiuj kaŝi, ke la koro krevas
pro nevideblaj kanceraĵoj siaj!

Kaj kiel multe, en la mond', ekzistas
da homoj, kies sola ĝoj' konsistas
nur en la ŝajn' de ĝojo por l' aliaj!



Guimarães Rosa kaj Esperanto*

Alóisio Sartorato

La unuan mencion pri la esperantisteco de Guimarães Rosa mi aŭdis en SAT-Kongreso okazinta en Campos de Jordão, Brazilo, de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto 1988. Tiam Lilian Ledon, filino de niaj karmemoraj Gilbert kaj Symilde Ledon, faris prelegon pri tiu temo. Bedaŭrinde mi ne alvenis ĝustatempe kaj sukcesis sekvi nur parton de la prelego. Interalie ŝi diris, ke ŝia esploro pri la temo ne estis finita kaj samtempe ŝi invitis aliajn fari la samon.

Pasis jaroj. Lilian Ledon malsaniĝis kaj ne daŭrigis sian esploron. Do antaŭ kvar jaroj mi decidis fari tion.

Mia unua esplorfonto estis la libro “Anais do XV Congresso Brasileiro de Esperanto”, Niterói E-Klubo, 1957. Sur la paĝo 178, ni legas jene:

“Por esse tempo (1929), o hoje médico e diplomata João Guimarães Rosa, o discutido escritor de “Sagarana”, então funcionário da Secção de Estatística do Estado, onde também militava Teixeira de Freitas, juntamente com éste, inovam ambos o sistema de comunicações internacionais daquele setor especializado.

Anteriormente, a correspondência com o estrangeiro era feita em diversas línguas desejadas.

Foi quando, em abril de 1929, Teixeira de Freitas e Guimarães Rosa decidiram que toda correspondência da Estatística com o exterior seria

escrita, única e exclusivamente, em Esperanto.

Se o destinatário da correspondência não conhecia a língua de Zamenhof era fácil. Bastar-lhe-ia ir em busca do delegado da Universala Esperanto-Asocio, pois, em cada carta, havia a indicação: “Internacia Korespondado en Esperanto”, e êle o traduziria para o interessado em sua língua natal.

“Esse passo já avançado do trabalho internacional da Secção de Estatística de Minas foi o germe que originou a monumental colaboração do I.B.G.E., posteriormente criado e que, hoje, é talvez, a organização estatal que dá ao Esperanto e aos esperantistas o mais franco e decidido apoio.

São sem conta as obras editadas pelo Instituto em Esperanto. O Movimento Esperantista Brasileiro, que tanto lhe deve, há de ser grato também àquela experiência, que nos longínquos idos de 1929, dois denodados batalhadores da causa faziam na pequena Secção de Estatística do Estado de Minas Gerais”.

Tiu informo estas konfirmita de la onklo de Guimarães Rosa, Vicente Guimarães, en la verko “Infância de João Guimarães Rosa”, sur paĝo 44/45:

“Vários idiomas, muitos, já dominava na juventude. Quando estudante de Medicina, trabalhou na Estatística, em Belo Horizonte. Seu chefe, Dr. Teixeira de Freitas,



precisando de uma pessoa para cuidar da correspondência em esperanto, chamou o jovem funcionário, já poliglota, e sugeriu que aprendesse a língua de Zamenhof. Seria o esperantista do serviço.

Jozito matriculou-se num curso e em vinte e sete dias recebeu o diploma, por já reter sabido e compreendido os conhecimentos todos do novo idioma. Escrevia e falava corretamente”.

Sur paĝo 12-a de la gazeto Brazila Esperantisto, julio-decembro/1929, ni trovas spurojn pri la agado de Guimarães Rosa en la brazila E-movado:

“BRAZILA KRONIKO/MINAS GERAES

Je la 1-a de Julio okazis kunveno de “Montara E-Klubo”...

... Legis rakonton de li verkitan S-ro João Guimarães Rosa.

“Minas Geraes” aperigis artikolon de S-ro Ary Theodolindo pri “La parolanta filmo; serio da

(*) Adaptita teksto de la prelego “Guimarães Rosa: Ĉu Esperantisto?”, prezentita dum la 40-a BKE, en Porto Alegre.

interesaj artikoloj de S-ro João Guimarães Rosa”.

Rilate al artikoloj pri E-o verkitaj de Guimarães Rosa, ni trovas informojn en “Anais do XV Congresso Brasileiro de Esperanto”, sur paĝo 177-a:

“... *Ari Teodolindo foi também presidente do M.E.K. Sob sua gestão, idealista e dinâmica, o M.E.K. atingiu excelente desenvolvimento. Por essa época, fez o Clube publicar no “Minas Gerais” diversos artigos de difusão da língua e da Idéia, subscritos por seus sócios.*

É assim que anotamos os seguintes:

“*A estrutura lógica do Esperanto. Algumas justificações. Um pouco de filosofia comparada*” – Em 31.7.1929 – de autoria de João Guimarães Rosa. (La kompleta teksto de tiu ĉi artikolo troviĝas en la retpaĝaro de KKE: www.kke.org.br)

No “Estado de Minas”, de 23 de julho de 1929, também dentro da “Semana do Livro Esperantista”, João Guimarães Rosa, o hoje consagrado autor de “Sagarana” e “Corpo de Baile” publicava: “*A estética do idioma de Zamenhof*” (La kompleta teksto de tiu ĉi artikolo troviĝas en la retpaĝaro de KKE: www.kke.org.br).

Per la legado de tiuj du artikoloj de Guimarães Rosa oni konstatas, ke li estis plene konviktita pri la taŭgeco de Esperanto por la solvo de la internacilingva problemoj.

Tamen verŝajne la movada aktiveco de Guimarães Rosa ne daŭris longe, ĉar en 1930 li konkludas la medicinan kurson, forlasas Belo Horizonte kaj iras al la interno de Minas Gerais por labori kiel kuracisto en malgrandaj urboj.

En 1934 li faras konkurson por la diplomatia kariero kaj estas aprobita. De tiam li laboras kaj kiel diplomato en diversaj lokoj kaj ankaŭ en kabinetaj taskoj en Brazilo.

Ĉu tio signifis ke Guimarães Rosa malesperantistiĝis? Ŝajne ne, ĉar tie kaj tie li lasis signojn pri sia respekto al la lingvo internacia.

Vicente Guimarães, la onklo de Guimarães, registras la jenan informon en sia libro “Joãozinho, Infância de João Guimarães Rosa”:

“*Alguns muitos anos depois, em meu apartamento no Flamengo, após o jantar, num encantador e prolongado bate-papo, transformado quase em uma deliciosa monoconversa – a palavra era dele, nossa apenas de quando em longe, para perguntas que renovassem os temas – minha filha Marli quis saber se o esperanto era assim tão fácil, que se podia aprendê-lo em 27 dias, como ele tinha feito. Sorrindo, respondeu: “Você, minha linda priminha, sabendo um pouco de alemão, francês, russo, espanhol, italiano, grego e latim, e a gramática de algumas outras línguas, o esperanto se torna facilímo”.*

Aliloke en tiu sama libro, responde al demando en intervjuo al sia kuzino el Curvelo, li sin esprimis tiel:

“*Falo: português, alemão, francês, inglês, espanhol, italiano, ESPERANTO, um pouco de russo; leio: sueco, holandês, latim e grego (mas com o dicionário agarrado); entendo alguns dialetos alemães; estudei a gramática: do húngaro, do árabe, do sânscrito, do lituânio, do polonês, do tupi, do hebraico, do japonês, do tcheco, do finlandês, do dinamarquês; bisbilhotei um pouco a respeito de outras. Mas tudo mal. Eu acho que estudar o espírito e o*

mecanismo de outras línguas ajuda muito à compreensão mais profunda do idioma nacional. Principalmente, porém, estudando-se por divertimento, gosto e distração”.

Lia filino, Vilma Guimarães Rosa, en sia verko “Relembrações: João Guimarães Rosa, meu pai”, ankaŭ registris lian intereson pri lingvoj kaj Esperanto tiamaniere:

“*Meu pai iniciou-se no francês e no alemão, que mais tarde conhecia por plano e profundidade, línguas e dialetos. Relacionou-se em amizade com o espanhol, o italiano, o inglês, o sueco, o dinamarquês, o holandês, o russo, o polonês, o lituano, o húngaro, o tcheco, o romani, o árabe, o hebraico, o japonês. O grego. E com o sânscrito, mãe de todas as línguas. Com o esperanto e o tupi.”*

Laŭ informo de Agnes Guimarães Rosa do Amaral, unu el la filinoj de Guimarães Rosa, kun kiu mi havis pertelefonan interparolon, li treege ŝatis lerni idiomojn kaj Esperanto estis por li tute nova mondo. Li alte aprezi la internacian lingvon kaj ĉiam instigis la filinojn lerni Esperanton. Bedaŭrinde ŝi ne sekvis la patran konsilon kaj sukcesis memori nur unu frazon, inter la multaj, kiujn la patro klopodis instrui al ili: “Leono estas besto!”

En 1950 Guimarães Rosa kontaktis la movadon. Estante Sekretario de la brazila ambasado en Parizo, li salutis, nome de la brazila registaro, la partoprenantojn de la 35-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en tiu urbo. La revuo Brazila Esperantisto en sia septembra-oktobra numero de tiu jaro registris la aferon tiel:

“*Na Sessão Solene de Abertura, à qual compareceram mais de 2000 representantes de toda a superfície*

da Terra, usaram da palavra o Sr. Jean Tomas, Diretor-Geral da UNESCO, em nome da Organização das Nações Unidas, os representantes de diversos governos que enviaram Delegações ao Congresso e as organizações nacionais de Esperanto. Pelo Governo do Brasil falou o nosso samideano Dr. J. Guimarães Rosa e pela Liga Brasileira de Esperanto o Dr. Benjamin Camozato.”

Okaze de lia morto en novembro 1967, la aprila/junia numero de la sekvanta jaro de Brazila Esperantisto nekrologis tiamaniere:

“Nia eminenta samideano Ambasadoro João Guimarães Rosa, konata verkisto kaj membro de la Brazila Literatura Akademio mortis la 19-an de Novembro 1967, en Rio de Janeiro.

Poligloto, li regis ankaŭ Esperanton, kiun li lernis ankoraŭ juna en Belo Horizonte.

Kiel Delegito de la Brazila Registaro li reprezentis nian landon en la XXXV Universala Kongreso de Esperanto en Parizo.”

Post tiaj konsideroj, mi pensas ke estas eksterdube ke João Guimarães Rosa estis sincera admiranto de Esperanto. Li ne nur lernis la lingvon, sed eĉ movadumis dum kelka tempo. Tamen restas unu aspekto esplora en la rilato de Guimarães Rosa kun la internacia lingvo. Temas pri la probbla influo de Esperanto en la verkado de Guimarães Rosa. En “Enciclopédia da Literatura Brasileira”, paĝo 1182-a, Afrânio Coutinho en la artikolo pri Guimarães Rosa skribis jene:

“...o seu processo de captação da realidade caracterizou-se também pelo esforço da valorização da palavra, de criação de uma linguagem própria adequada à representação de seu mundo mítico do sertão. Nessa tarefa de recriação da linguagem, usa todos os recursos, desde a invenção de vocábulos por vários processos, até os arcaísmos e palavras populares, e invenções semânticas e sintáticas ...

La esploro pri tiu temo eble meritus universatatan tezon. Sed ĝi iru al pli kompetentaj manoj!

BIBLIOGRAFIO:

- Ĵurnalo “O PAIZ”, de la 12-a de Aprilo 1898;
 Revuo “Brazila Revuo Esperantista”, Aprilo kaj Majo 1907;
 Graciliano Ramos – Confirmação de uma Obra, Clara Ramos;
 Revuo “Rio Esperantista”, Aprilo-Junio/1997;
 Anais do XV Congresso Brasileiro de Esperanto, Niterói E-Klubo, 1957;
 Revuo “Brazila Esperantista”, Julio-December/1929;
 Ĵurnalo “Estado de Minas Gerais”, 23/07/1929;
 Ĵurnalo “Minas Gerais”, 31/07/1929;
 Joazito – Infância de João Guimarães Rosa, Vicente Guimarães, José Olimpio Editora, 1972;
 Revuo “Brazila Esperantista”, Septembro-Oktober/1950;
 Revuo “Brazila Esperantista”, Aprilo-Junio/1968;
 Enciclopédia da Literatura Brasileira, Afrânio Coutinho, FAE/MEC, 1995;
 Relembrações: João Guimarães Rosa, Meu Pai, Vilma G. Rosa.

DANKOJ:

- Al S-ano Roberto Fausto da Silva, el Belo Horizonte, kiu, laŭ mia peto, ĝentile sukcesis liveri al mi la fotokopiojn de la artikoloj verkitaj de Guimarães Rosa.

Al S-anoj Jair Salles kaj Paulo Sérgio Viana, kiuj bonvoleme reviziis ĉi tiun tekston kaj proponis plibonigojn.



3 - 4 februaro 2008

DOMO DE KULTURO DE LORENA

R. Viscondessa de Castro Lima, 10

Lorena - SP

Por pliaj informoj skribu al

psviana@terra.com.br

BEL konferencoj



Poezikkvizo

Cícero Gabriel (Kikero)

Ĉu vi ŝatas poezion? En la Esperanta Literaturo, poezio ĉiam grave rolis. Eĉ la plej seriozaj kaj sciencemaj esperantistoj, de tempo al tempo, gapigas nin per soneta peko en ia beletra revuo. Ĉi tiu malpeza ekzameno celas taksĭ, ĉu vi bone konas nian poezian tradicion. Sekvu la instruojn kaj penu atingi la celon en glor'!

1) Kiu estas konsiderata la patro de la esperanta poezio?

- a) Zamenhof **Iru al paragrafo 5**
- b) Grabowsky **Iru al paragrafo 12**
- c) Kalocsay **Iru al paragrafo 18**

2) Maura estas pseudonimo de G. Waringhien. La talenta franca verkisto kaj tradukisto esperantigis multajn poemojn, ĉefe el la franca. Kaj li verkis originale (Duonvoĉe) sub la pseŭdonimo G. E. Maura. Sed ne li verkis Ebrio.

Revenu al paragrafo 7

3) *Agordu la brustojn, ho nia fratar' / Por nova, pli vigla jam kanto! / Ĝi sonu potence de montoj al mar' / Anoncu al ĉiu dormanto: / Tagiĝo, tagiĝo radias en rond' / La ombroj de nokto forkuras el mond'!* Jes, fakte ĝi sonas kvazaŭ himno. La pola poligloto (li pli-malpli sciis ĉirkaŭ 30 lingvojn) postlasis tiun simplan kaj kortuŝan pecon. Alia polo, same poligloto, furoris siatempe kiel kompetenta tradukisto. Kiu li estis?

- a) Kazimierz Bein **Iru al paragrafo 15**
- b) Edmond Privat **Iru al paragrafo 8**
- c) Stanislav Schulhof **Iru al paragrafo 9**

4) Certe, Baghi, kune kun Kalocsay, estas la ĉefaj redaktoroj de LM. Baghy multifacete laboris por la afero: aktorĭs, reĝisorĭs, verkis, poetis, instruis, organizis. Lia personeco influis la tutan intermilitan generacion. Lia stilo viva kaj sincera tuj kaptis la esperantistarĭon. Divenu tiun kiu, el la subaj pecoj, apartenas al lia plumo:

a) *La poezion, kiun vi mem plektas / Per viaj sorĉaj manoj kaj mieno, / Dum viaj amaj ĝojo kaj ĉagreno, / El mia tuta koro mi elektas (...)* *Mi kantu nur por vi!*

Ĝis lasta spiro, / Mi estas via bardo, ho homaro! (El: *Poeto de la homaro*)

Iru al paragrafo 6

b) *Kion mi faru pli la aliĝilo — / Blanka kaj nigra, sen vivanta brilo? Nomo: ne scias mi; mi estas homo / Kun multaj memoj kaj nenia nomo. / Adreso: eble mia eĉ ankoraŭ / Kaj por eterne estas simple: Morgaŭ.* (El: *Aliĝilo*)

Iru al paragrafo 14

c) *Hirte flirte flugas haroj, / siblas vintra vent' ... / Morde torde ŝiras koron / Larmoj kaj la sent' ... / Kant' patrĭna plore sonas / dormas filo en lulil' ... / (...)* "Baju, baju, bajuŝki... / Dormu sonĝe, dormu vi ... (El: *Siberia lulkanto*)

Iru al paragrafo 7

5) *Ho, mia kor' / Ne batu maltrankvile / El mia brusto nun ne saltu for.* Certe Ho, mia kor' povus esti rigardata kiel la unua filo de nia poezio, sed ne Zamĉjo havas tiun titolon.

Reiru al paragrafo 1

6) Temas pri unu el la magie poluritaj sonetoj de Geraldo Mattos!

Reiru al paragrafo 4

7) Jes, jen la stilo klara kaj kortuŝa de Baghy en sia tuta forto. Siberia Lulkanto estas unu el lia plej famaj. Vidu alian famkonatan poemon de alia granda poeto: *La boteloj staras vice, / kamarade kaj komplĭce / sur la altaj murobretoj — / botelegoj, boteletoj, / verdaj, flavaj, / grasaj, kavaj / palpebrume en la lumo / min invitas al konsumo, / gluta, tuta, / ĉes-refuta / forkonsumo de l' enhavo, / de la verdo, de la flavo, / de likvoro glate glita / svate ŝvĭta / kvate kvita / strate strita / streta / struta.* (El: *Ebrio*)

Kiu ĝin verkis?

- a) William Auld **Iru al paragrafo 13**
- b) Georgo Maura **Iru al paragrafo 2**



8) La sviso Privat en sia 16-jara datreveno jam surprizis la partoprenantojn de la unua kongreso per sia elokvento. Li estis unu el niaj plej bonaj oratoroj kaj sendube altranga stilisto, sed li verkis originale, ne traduke. Lia ĉefverko estas Vivo de Zamenhof, kie li prezentas la historion de Zamenhof kaj de E-o en tre poezia kaj bela tono. Per ĝi, li fariĝis la unua historiisto de E-o.

Reiru al la paragrafo 3

9) Schulhof estis ĉeĥo, multe verkis en la ĉeĥa antaŭ ol debuti 57-jara en E-o. Li estis la unua lirikisto en E-o, kaj lia Kanto de Sklavo estas tre konata. En En amara horo Kalocsay lin mencias: “La Kanton de la Sklavo ne kanti plu Schulhofe.”

Reiru al la paragrafo 3

10) Ne. La poemon de la kolombo, kvazaŭ anoncon de mondfino kaj espero, verkis la ĉiomflanka e-isto Francisko Szilágyi.

Vidu pecon el ĝi kaj reiru al paragrafo 12

La buŝoj brule kraĉis sangajn vortojn, / la mond' flamiĝis, veis vana plend', / kaj blinde serĉis vojon l' orfa homo, / en fulmobril' mi vagis sen defend'. / Ĉifonoj pendis de la korpoj homaj, / inundo bruas, tondris roko-rompo; / Sed mi kredis, frato: flugis / al la ter' kolombo.

11) Schwartz estis la humoristo de la e-a mondo. Lia verstekniko ĉiam perfekte stilis, kaj lia sprito ironie pinĉis ĉiuajn. Vidu ekzempleron: *En supra ĉambro, lulo... lulo... / Anĝele dormas la etulo: / Etaĝo. Sed baldaŭ li el dorm' sin ŝiras / Kaj pri la bela mondo miras: / Miraĝo. Jam ne plu side li tamburas, / Sed tra la dom' explore kuras: / Kuraĝo.* (El: *La diversaj aĝoj de l' homo*)

Sed, reiru al la paragrafo 15

12) Prave! Antoni Grabowsky, polo, inĝeniero, esperantistiĝis tuj post la apero de la Unua Libro. Laŭdire, inter li kaj Zamenhof okazis la unua konversacio en Esperanto. Lia ĉefa verko estas la traduko Sinjoro Tadeo, de Mickiewicz. Inter lia originala produktado staras poemo kiu statas kvazaŭ la dua himno e-ista.

Kiu ĝi estas?

- a) La Tagiĝo
- b) Zamenhof
- c) Lasta Kiso

Iru al paragrafo 3

Iru al paragrafo 10

Iru al paragrafo 16

13) Jes, la produktiva Auld estas nia plej fama nuntempa poeto. Redaktoro de Esperanta Antologio, li verkis traduke kaj originale. Al li apartenas la epokfara La Infana Raso, inter multaj aliaj pecoj tre ŝatataj en E-ujo.

Vi alvenis al la fino. Gratulon pro la sukceso! “*fide mi vin salutis ĝojmiene / ĉar via ĝojmieno pruvis plene, / ke en mi simpation vi rekonas*” (El: *En mia mio, Auld*)

14) Tiu venas de la kreiva kaj riĉa plumo de nia kara Marjorie Boulton.

Reiru al paragrafo 4

15) Jes! Kabe, la unua stilisto esperantista. Ververe, Kabe ne famiĝis pro poezio, sed lia ĉefverko, La Faraono, de la pola Boleslaw Prus, profunde influis la tutan literaturan mondon. Literatura Mondo? Dum la intermilitaj jaroj ekzistis monata revuo samtitola grave rolanta en nia beletro. Kiu sube estas inter la ĉefaj redaktoroj de Literatura Mondo?

- a) Julio Baghy
- b) Hilda Dresen
- c) Raymond Schwartz

Iru al paragrafo 4

Iru al paragrafo 17

Iru al paragrafo 11

16) Vi kien flugas, papilio, / Tremante kaj rapide? / Jam mortis rozo kaj lilio/ Kaj venas frost' perfide. Edmond Privat estas la aŭtoro de ĉi tiu ĉarma kaj imagohava poemo.

Ĉarme reiru al la paragrafo 12

17) Multaj poemoj, originalaj kaj tradukitaj, aperis en LM per la plumo de Hilda Dresen, eble la unua grava virino en nia poezio. Sed ŝi neniam redaktoris.

Reiru al paragrafo 15

18) Laŭ Auld, Kálmán Kalocsay “*kvazaŭ mem ellaboris la tutan tradicion poetikan de E-o*”. *Sendube Kalocsay estas la plej grava figuro de la E-a poezio, sed ne nia grandioza hungaro havas la titolon “la patro”.*

Reiru al paragrafo 1

La marko "Esperanto"

La marko "Esperanto" estas registrita en Brazilo laŭ la numero 824517458, kiel atestas la periodaĵo RPI (Revista de Propriedade Industrial - Revuo pri Industria Propraĵo), numero 1638, publikigita la 28-an de Majo de 2002. Sekve, la uzado de tiu ĉi marko por nomi iun ajn varon dependas de formala permeso de BEL.



INANIA VERBA (Vanaj vortoj)

Olavo Bilac
Tradukis Geraldo Mattos

Ha! kiu tion diros, neforta sklavanimo,
Kion ne diras buŝo, kaj mano ne kopias?
— Vi ardas, krucumita vi sangas, agonias
Kaj, kio vin ĵus ĉarmis, vi vidas nun en ŝlimo...

La penso fajre bolas, torenta laf' sen limo:
La densa frosta formo neĝtombe mortglacias...
La peza vort' ideon leĝeran asfiksias,
Kiu, parfum' kaj brilo, sparkflugis en sublumo.


Kiu muldilon trovos por diri ĉion, tutan?
Ha! kiu do esprimos l' afliktojn infinitajn
De l' revo? la ĉielon fuĝantan al mantuŝo?

Mutan koleron? naŭzon? kaj malesperon mutan?
Kaj tiujn kredparolojn neniam eldiritajn?
Kaj tiujn amkonfesojn mortintajn en la buŝo?

Belartaj Konkursoj 1957,
1-a premio en Poezio Tradukita

"BEL Informas"

Por fari facila kaj rapida la dissendadon de novaĵoj pri la brazila Esperanto-movado, BEL uzas la periodaĵon "BEL Informas", kiun redaktas nia vicprezidanto, Paulo Sérgio Viana. Se vi deziras informi viajn samideanojn pri iu ajn evento, kontaktu: psviana@terra.com.br.



La Homoj; La Vojaĝoj

Verkis: Carlos Drummond de Andrade,

Tradukis: Aloísio Sartorato

La homo, tiu eta vermo,
tediĝas en la Tero,
loko de granda mizero kaj eta amuzo,
konstruas rakedon, kosmoŝipon,
ekflugas al la Luno,
zorge surluniĝas,
tuŝas la Lunon,
hisas flagon surlune,
provas la Lunon,
civilizas la Lunon,
koloniigas la Lunon,
humanigas la Lunon.

Luno humanigita — Tiom egala al Tero.
La homo tediĝas sur la Luno,
Ni iru al Marso — li ordonas al la maŝinoj,

Ili obeas, la homo surmarsigiĝas,
tuŝas Marson,
provas,
koloniigas,
civilizas,
humanigas Marson kun talento kaj arto:

Marso humanigita — kia teda loko!
Ĉu ni iru aliloken?
Kompreneble, respondas la maŝino obeeme,
Ni iru al Venuso!
La homo iras al Venuso,
vidas ĉion — Ĉu nur tio?
Same
Same
Same

La homo frenezigiĝos, se li ne iros al Jupitero
proklami la Justecon kaj ankaŭ la maljustecon
denove tediĝi
denove enuiĝi.

Sed ekzistas aliaj planedoj por konkeri
La tuta spaco iĝas Tero
La homo alvenas al la Suno
kaj inventas vestaĵon
uzeblan sur la Suno.
Piedtuŝas ĝin
Sed kiom teda ankaŭ ĝi estas!
Falsa hispana taŭro dresita.

Krom la Suno ankoraŭ ekzistas
aliaj sistemoj por koloniigi
Ĉe la fino
restos al la homo
(ĉu li estas preparita?)
la malfacilega, la danĝeriga vojaĝo
enen de si mem,
tuŝi la kernon
de sia koro,
provi
koloniigi
civilizi
humanigi
la homon,
eltrovante interne de si mem
la eternan kaj nesuspektindan ĝojon
de la kunvivado.

Esperanto

15

N
r
o
3
3
1
N
o
v
2
0
0
7

<http://www.esperanto.org.br>

La vitralo

Verkis: Osman Lins, Tradukis: Francisco Stefano Wechsler

Antaŭlonge ŝi sciis, ke la datreveno, ĉi-jare, okazos dimanĉe. Sed nur kiam mankis kvar aŭ ses semajnoj, ŝi ekvidis en la koincido promeson de neordinaraj ĝojoj kaj invitis la edzon fari fotoproteon. Ŝi kredis, ke ĝi kaptos ŝian ĝojegon, samkiel la portreto de la Unua Komunio estis reteninta por ĉiam la kantikojn.

— Nu... Ni havas tiom da ili... — respondis la viro. Se ni havus filojn... Tiel, jes. Sed ni du? Por kio la fotoj? Du gemaljunuloj?

Lia maldekstra mano, levita, kun la montra kaj longa fingroj disigitaj, ŝajnis igi la solecon afero netuŝebla — kaj ŝi rekonis sin malĝoje ĉe la pli eta fingro, pli maldika kaj kurba. Ŝi estis kumpinglinta siajn nigrajn, glatajn harojn, duigitajn simetrie, kaj stariĝis.

— Bone. Vi ne volas...

(La naza voĉo, regata, estis antikva signo de ĉagreno.)

— Viaj stultaĵoj, Matilde... Kiam ĝi okazos?

Kvazaŭ la ideo hontigus ŝin, ŝi kapklinis:

— Septembre — ŝi diris. La dudek-kvaran. Ĝi okazos dimanĉe, kaj mi...

— Ha! Memorfesto — interrompis la edzo. Dudek jaroj de geedzeco... Milda kaj printempa portreto. Kiel ni.

En la antaŭtago de la datreveno, kuŝiĝante, ŝi ankoraŭ memoris tiujn vortojn; sed ŝi puriĝis el la ironio kaj ripetis ilin silente, sentante sin rekondukata al la spiritostato, kiu venadis al ŝi infanaĝe, en similaj noktoj: svingado inter la espero de ĝojoj kaj la timo ne ricevi ilin.

Nun, jen la dimanĉo, hela kaj varmeta, kun sunfasketoj sur la

mozaiko, la lito, la muroj, sed ne kun la revataj ĝojoj, sen kiuj ĉio alia fariĝas senesprima.

— Se vi ne volas, mi ne insistos pri la portreto — ŝi diris. Stultaĵo mia.

— La fotisto jam certe atendas. Kial vi ne ŝanĝas la hararanĝon? Ankoraŭ restas tempo.

— Ne. Mi iros tia ĉi mem.

Ŝi malfermis la pordon, ili elpaŝis. Flosis malmultaj blankaj nuboj; la aglajfolioj* havis netravedeblan brilon. Ŝi donis brakon al sia edzo kaj sentis, mirplena, ĝojanoncon en la aero, kvazaŭ io ene de ŝi atendas tiun geston.


Ili pluiris. Blovis subita vento, fenestro malfermiĝis, la suno ekflamis sur la vitroj. Forta virina voĉo ekkantis, estingiĝis, akordionmuziko burĝonis, kreskis. Kaj kiam la sonorilo de la ĉefpreĝejo komencis vibri, kun neŝancelebla kaj sobra paco, ŝi konstatis, ĝojegante, ke la portreto ne restos malplena: la sensubstanta riĉo de tiuj minutoj animos ĝin por ĉiam.

— Belega mateno! — ŝi murmuris. Hodiaŭ mi volus esti knabino.

— Vi ja estas.

La aserto povus esti riproĉo, sed kiel eltrovon Matilde ĝin akceptis. Ŝia koro batis forte, ŝi sentis sin kapabla je multa ridado, longaj promenoj, kaj bedaŭris, ke la edzo, serioza, muta, ne partoprenas ŝian ĝojegon. Tiele ŝi gardos, tra la jaroj, solecan ĝojon, de kiu Antonio por ĉiam forestos.

Sed kiu povus certigi, ŝi meditis, ke li estas ne la partoprenanto de ŝia ĝojo, sed la kaŭzo mem de ĉio, kion ŝi sentas ĉi-momente; kaj, sen li, la mondo kaj ĝiaj belaĵoj ne havus sencon?



Ŝi tiuj demandoj havis la pezon de asertoj, kaj ŝi ekkriis, ke ŝi sentas sin feliĉa.

— Profitu — li konsilis. Tio forpasos.

— Ĝi forpasos. Sed iom el ĉi tio daŭros en la portreto. Mi scias.

La du ombroj, kune, glitis sur la muro kaj trotuaro, sur kiu resonis iliaj paŝoj.

— Ne eblas gardi la plej etan ĝojon — li diris. Ĉe io ajn. Neniu vitralo retenas lumon.

Kvin knabinoj aperis ĉe la stratangulo, iliaj batistaj vestoj ŝajnis transdoni malpezecon, ili postkuradis unu la alian, fordonante sin al la infanaĝo kaj dimanĉo, kiuj forte trafluas ilin. Ili transiris la straton, malfermis pordeton, malaperis.

Ŝi premis la brakon de sia edzo kaj ridetis, sentante preskaŭ angoran ĝojegon ŝprucanta el ŝia fundo. Ŝi ekkomprenis, ke ĉio tio estas nekaptebla: ŝi trompiĝis aŭ subtaksis la momenton, supozante, ke ŝi sukcesos gardi ĝin. “Ĉi tiu momento ekposedu min, prilumu min kaj malaperu — ŝi pensis. Mi vivis ĝin. Mi ĝin estas vivanta.”

Ŝi sentis, ke la sunlumo trapasas ŝin, kvazaŭ vitralon.



*Aglajo: diversaj plantoj de la genro Aglaia, familio Meliacoj.

Zamenhofa Tago

la 15-an de decembro

Celebru kaj poste
sendu raporton
al BE

Ulisses Baldez



Afiŝu en **BE**
pri via varo
aŭ servo

(Vidu anonctarifon sur p. 3)

La hirundoj de Campinas

Aŭtoro: Rui Barbosa, Tradukis: Floriano Pessa



Rui Barbosa, la mondkonata brazila verkisto, oratoro, ĵurnalisto kaj politikisto kutimis viziti kuzon kaj amikon en Campinas, ŝtato San-Paulo. En unu el tiuj vizitoj li ĉeestis kaj poste priskribis la revenan flugon de hirundoj, ĉe la sunsubiro. Por ekzerciĝo en la malfacila arto-tekniko de tradukado, mi provis esperantigi la belan portugallingvan originalon.

Sur la klara, jam sensuna lazuro, antaŭ ol tute forsvenis la ora tono de ties eroj el lumo, kaj kiam la vesperkrepusko ek mildigas la brilon de la safiro ĉiela, tiam jen malhela punkto, apenaŭ perceptebla en la forega spaco, nigre konturiĝas sur la ĉiela volbo, tre alte, ĉe la zenito, kvazaŭ la pinto de sago, perpendikulare pafita de transe, trapikus tie la bluan firmamenton.

Komence unu, tuj poste jam multaj, ŝprucas nekalkuleblaj, jam ŝajnas al ni senfinaj; kruciĝas, rekruciĝas, renkontas unuj aliajn, cirkulas, densiĝas en ombran amason.

La birdaro pligrandiĝis kaj jam kreskas per longaj flugantaj vicoj, jam bolas per sinsekvaj svarmoj, jam etendiĝas en vastan skuiĝantan nubon. Tutkovris la ĉielon, plenigis la aeron, kaj ondas super niaj kapoj.

Nun, fine, moviĝante kiel granda malhela ondo blanke trapunktita, kiu ŝvebus inter la tero kaj la senfino, descendas la senhalta maso, bruante, svingiĝante, flirtante en la aero; ĝi traŝiriĝas tra la pintoj de palmarboj, skurĝas la telegrafajn dratojn, ŝoviĝas sur la domaj tegmentoj kaj finfine, laŭcirkle balanciĝante, per bruega kirliĝa moviĝado, plaŭdante kiel kaskado el arĝento, kiel torento el diseriĝantaj kristaloj, — ĉe kio vigle sonas dekmilvoĉa pepado kaj blekado — kliniĝas, plonĝas kaj malaperas, laŭ tre granda ŝaumanta kurba strio, super larĝa forlasita remizo, kiun tiu vaganta birdaro elektis, por sia ŝirmo kaj ripozo, inter ni, en la varmaj noktoj de somero.

Sizenando, la vivo estas trista

Verkis: Rubens Braga, Tradukis: Aloísio Sartorato

Estas pruvite ke vekigi pli frue plilongigas la tagon. Ĉi tiu frazo ne estas mia kaj bedaŭrinde mi ne sukcesis ekscii la nomon de ĝia aŭtoro, ĉar mi vekigis frue, sed ne sufiĉe frue.

Kiam mi ŝaltis la radioricevilon je la 06:10, la leciono jam estis komenciĝinta. Mi aŭdis la programon ĝis la fino, sed mi ne sciis la nomon de la instruisto. Li diris:

“La verando estas vera ĝardeno plena de floroj”.

Mi neniam studis Esperanton, sed mi supozas ke tio signifas portugale ke “la verando aŭ la somero estas plena de floroj en la ĝardeno”. Iel ajn tio estas bona novaĵo, io pozitiva. Sed mi konfesas ke, en iu momento, mi decidis elekti alian radiostacion. Mi estas spirito malkvieta. La dekstra radiostacio informis pri la situacio en Argel, krizo en Francio. Mi elektis alian, kiu ludis boleron. Mi transiris al alia, kiu prezentis reklamojn. Mi decidis reveni al mia ĝardeno plena de floroj en Esperanto.

Nun la instruisto estis respondanta al leteroj de legantoj. S-ro Sizenando Mendes Ferreira, el Iporá, Goiás¹, skribis dirante ke li opinias la lecionojn tre interesaj kaj volas enskribi kiel lernanto.

Mi estas internlanda homo, mi sentas min tiel. Kelkfoje, mi pensas ke mi meritis esti “gojasano”². La mateno estis malhela kaj pluva en

Ipanema³ kaj kortuŝis min scii, ke en tiu sama momento, en la fora internlando de Goiás, ekzistas iu Sizenando, brazilano kiel mi, kiu lernas ke “la ĝardeno estas plena de floroj” kaj eble skribas tion sur kajero. Ne gravas ke en ĉi tiu momento ekzistas milionoj da brazilanoj kiuj dormas, dum aliaj milionoj trinkas kafon aŭ banas sin per duŝilo aŭ estas survoje al la laborejo aŭ ke mia amatino, Joana, ĝuste en tiu ĉi minuto eliras el la nokta klubo Sachas kaj eniras en la aŭton de tiu stompanato de Botafogo. Mi kaj Sizenando kultivas la kulturan ĝardenon “plena de floroj”. Iamaniere ni estas la elito de Brazilo, ĉar ni frue vekigis.

Tiam la instruisto, eble instigita pro la atento de la “gojasa” aŭskultanto, komencis fari malgrandan prelegon pri la utileco de Esperanto kaj ankaŭ pri la avantaĝo vekigi frue. Estas pruvite ke vekigi pli frue longigas la tagon. Ĝi ne estas tre subtila frazo, sed tiel pura kaj bonintenca ke ĝi povus aparteni al skoltisma regularo. Esence devas ekzisti ligiteco inter skoltismo, Esperanto kaj vekigi frue. Jen manko en mia vivo — neniam mi estis skolto. Nun estas tre malfrue por skoltumi, sed eble ankoraŭ estas tempo por lerni iom pri Esperanto. Mi kaj tiu Sizenando.

Mi havas amikon, diris la instruisto, kiu konfesis al mi ke li neniam estis aŭdinta mian programon, ĉar li vekigis tre malfrue. Nu, hieraŭ li vekigis frue kaj aŭskultis la programon. Li informis al mi ke li sentis sin tre bone



la tutan tagon. La instruisto mem estis kontenta pro tiu deklaro de la amiko, oni sentis tion en lia voĉo. Mi murmuris al mi mem ke plej bone estas: ĉiutage vekigi frue, aŭskulti mian Esperanto-lecionon kaj poste, se hazarde ekzistos leciono pri gimnastiko, sekvi ĝin. Mens sana in corpore sano. En la fino de la monato, la geamikoj surpriziĝos: kiel Braga aspektas bone! Ĉi tiu penso revigligis min. Mi etendis la manon por preni cigaredon el la tablo, tamen mi fumis ĝin memproĉe. Tutcerte Esperanto devas esti kontraŭ la fumado kaj favore al skoltismo. “Mi estas bruna”. Tio signifas ke mia haŭto estas malhela. “Mi estas bruna, ho filinoj de Jeruzalemo”, diris Sulamita.

En tiu ĉi momento, Joana certe estas en la aŭto de tiu fripono, ĉe liaj brakoj, duonebria pro la viskio. Tutcerte ŝi iros al lia apartamento. Tiu stultulo, kiu ne scias eĉ unusolan vorton en Esperanto!

La vivo estas trista, Sizenando!

1 ŝtato en centra regiono de Brazilo
2 ano de Goiás
3 suda kvartalo en Rio de Janeiro

Machado de Assis – La Malprobabla Geniulo

Paulo Sérgio Viana

Machado de Assis estis sendube eksterordinara homo, tamen misloka kaj mistempa. Ĉi tion konfirmas kelkaj ciferoj pri Brazilo, en la komenco de la 20-a jarcento. Laŭ oficialaj statistikoj, en 1900 vivis en Brazilo 17 000 000 da homoj (nun 160 000 000), 690 000 homoj en la urbo Rio, 240 000 en la urbo San-Paŭlo. En tiu sama jaro analfabeteco atingis 65% el la loĝantaro (nun 13,5%), la vivŝanco estis meze 33,6 jaroj (nun 68,6 jaroj), la riĉeco (interna brutta produkto) “individua” estis 510 realoj (nun 6000 realoj). En 1908 ekzistis en la lando 1 000 000 da voĉdonantoj (nun 108 000 000). Kaj en 1933, 23 000 studentoj (1 900 000 en 1998). Tiutempe, do, laŭ ĉiaj indikoj, Brazilo estis geografie, ekonomie kaj kulture periferia lando, tute ne grava kaj seninflua en la mondo. Krome, ĝi malfrue forigis sklavecon (1888) kaj negroj ankoraŭ multe suferis de tio (parte ĝis nun!). Ĉi tio aldonis al la lando karakteron maldemokratian kaj maljustan. Temas do pri neoportuna loko kaj tempo por stariĝo de geniulo en beletro, kia estis Machado de Assis.

Tamen, male al aliaj geniuloj, kiuj vivis en kulture kaj ekonomie prestiĝaj landoj (Hugo, Balzac, Tolstoj, Dostojevskij, Dickens, Proust, Eça de Queiróz), li devis superi ĉiajn barojn per obstino, seriozeco kaj diligenteco, kaj fariĝis ankoraŭ dum la vivo rekonata kiel supera artisto. Kaj lastatempe eĉ la internacia publiko ekkakceptas tion: Harold Bloom, la severa usona kritikisto enmetis lian nomon en la

liston de la cent plej altaj mondaj geniuloj de la jarmilo.

M. A. naskiĝis en 1839, en Rio, en bieneto sur monteto Livramento, en mirinde malriĉa familio. Ili servis al riĉa politikisto, kiu estis senatano en la imperio kaj dufoje ministro pri Milito. Lia edzino simpatiis al la familio de M. A. kaj akceptis bapti la knabon kaj protekti lin dum la unuaj vivojaroj.

Lia patro estis mulato, ido de sklavoj, murfarbisto. Lia patrino estis portugalingo, tollavistino; ŝi frue mortis kaj la patro reedziĝis al Maria Inês, bonkora mulatino, kiun M. A. estimis kiel sian veran patrino — kaj kiu instruis al li legadon kaj skribadon. Post nelonge ankaŭ la patro mortis, kaj la knabo plu vivis kun la adoptinta patrino en malfacilaj cirkonstancoj. Li estis balbutulo kaj de infana tempo devis perlabori la vivon. Li frue komprenis, ke li devos senlace penadi por fariĝi respektata homo. Li laboris en panvendejo kaj en presejo, kiel helpanto. De adoleska aĝo li ekfrekventis bibliotekon kaj multe lernis sola; la francan lingvon li akiris de franca panvendejestrino, en sia kvartalo. En tiu tempo, fariĝis lia amiko kaj spiritgvidanto pastro Silveira Sarmiento, kiu instruadis kaj indikadis legaĵojn.

Ankoraŭ tre juna, li komencis ĉeesti hejmajn kunvenojn de konatoj, kiuj interesiĝis pri kulturaj aferoj. Meze inter ili aperis Antonio Gonçalves Teixeira e Sousa, kiu verkis la unuan brazilan romanon “Ido de Fiŝkaptisto”, publikigita en



1843. Al tiu intelektuala grupo aliĝis poste gravaj verkistoj, kiel José de Alencar kaj Manoel Antonio de Almeida.

M. A. laboris por tre modesta salajro, kiel tipografiisto, sed li ĉiam amis legadon kaj revis fariĝi verkisto. Li komencis tion per tre romantikaj poemoj kaj polemikaj artikoloj en revuoj. Li laboris ankaŭ kiel reviziisto kaj tradukisto. Je la 21-jara aĝo li fariĝis redaktoro de ĵurnalo en Rio. Li multe laboris kaj liaj nuaj publikaĵoj estis tradukoj (inter ili tiu de “La Marlaboristoj”, de Victor Hugo) kaj drametoj.

M. A. estis diligenta, afabla, honesta kaj serioza homo. Liaj artikolaj opinioj estis klaraj kaj foje atakaj, por demokratiaj kaj liberecaj ideoj. Li estis la unua brazila verkisto, kiu pledis por la rekono de Tiradentes kiel martiro por sendependiĝo de Brazilo.

Lia unua poezia verko, “Krizalidoj”, aperis en 1864 kaj favore akceptiĝis ĉe la brazila kaj portugala kritikoj. Lia prestiĝo kreskis, kune kun iom pli bona financa situacio, kiel ŝtatoficisto. Li amikiĝis al Casimiro de Abreu, Quintino Bocaiúva, Castro Alves, Fagundes Varela, Joaquim Nabuco kaj multaj aliaj gravuloj, kiuj konsideris lin la “unua brazila kritikisto”. (Daŭras sekvapaĝe)

En 1869 li edziĝis al Carolina, kaj tio pozitive markis lian vivon. Ŝi estis kvar jarojn malpli juna ol li, inteligenta kaj prudenta, kaj ege apogis la edzon en la praktika vivo kaj en verkado. Ŝi devenis de bonstata portugala familio sed akceptis kun la edzo tre modestan vivnivelon. Dum la unua tempo, M. A. produktis poezion, rakontojn kaj novelojn iom proksimajn al la romantika skolo. Sed alvenis ĉirkaŭ lia 30-a vivojaro la unuaj krizoj de epilepsio. Li pasigis ankaŭ 6-monatan periodon de grava intesta malsano, kiu devigis lin ripozi en Nova Friburgo, pro kompleta malfortiĝo. Tiam li komencis novan, realisman periodon de sia verkista kariero, per la produktado de sia ĉefverko: "Postmortaj Memoroj de Brás Cubas". Ties unuajn ĉapitrojn li diktis al sia edzino, pro la malsano. Sekvis aliaj majstroverkoj: "Dom Casmurro", "Quincas Borba", "Esav kaj Jakob", "Taglibro de Aires" kaj multaj (entute pli ol 200) altnivelaj rakontoj. De tiam, firmiĝis la granda

artista, ne nur pro la historioj, kiujn li kreis, sed ĉefe pro la animo de la figuroj, pro iliaj pensoj, pro la priskribo de ilia homa naturo, pro lia kapablo sugesti ideojn sen plena formulado. De tio rezultis lia moknomo, en sia tempo – "sorĉisto de Cosme Velho" (alude al la kvartalo, kie li dumlonge loĝis, en Rio). Kaj ĉefe pro la mirinde eleganta, senpasia, simpla stilo, plena de ironio kaj iom amara pesimismo. Ekzemplojn oni legu en "Dediĉo", kiu enkondukas la "Postmortajn Memorojn", en la famaj rakontoj "Apologo" kaj "La Alienisto" kaj en la unuaj linioj de la rakonto "Miss Dollar". Liaj homtipoj estas universalaj: Capitu, Brás Cubas, Quincas Borba, Bentinho... Liaj frazoj eniris la brazilan esprimaron: "Al la venkinto, la terpomojn!"; "Mi lasos al neniuj la heredaĵon de homa mizero."

Kvankam M. A. ne havis radikalajn sintenojn koncerne politikon, li tamen batalis por socia justeco, ĉefe rilate abolicion de sklaveco. Li persone simpatiis al Imperiestro Petro II-a, kio venigis al li malsimpatio, okaze de proklamo de respubliko, en

1889. Li ne estis kontraŭ respubliko, sed klarvide komprenis, ke simpla ŝanĝo en la reĝimo, sen modernigo de la socia strukturo, ne kondukos la landon al progreso.

En la unuaj jaroj de respubliko fondiĝis Brazilia Akademio de Beletro, laŭ la franca modelo, kun tolerema akcepto de ĉiaj tendencoj. M. A. aktive partoprenis en ĝia organiziĝo kaj per aklamado fariĝis la unua prezidanto. Lia morala aŭtoritateco estis sendiskuta kaj eĉ lia agresema kritikanto — Sílvio Romero — estis invitita partopreni en la institucio.

M. A. forpasis en 1908 sed fariĝis senmorta pro sia verkaro kaj sia valoro. En malklera, malgrava lando, ido de malriĉuloj, nepo de sklavo, orfo, mulato, balbutulo, epilepsiulo, modesta ŝtatoficisto — li estis tre malprobabla sukcesonto. Ne tiel decidis la destino kaj lia interna forto. Li fariĝis la plej elstara el niaj verkintoj. Ankoraŭ hodiaŭ estas aŭtentika plezuro tralegi la mirindajn tekstojn de nia geniulo.

E

***Leteron post leter', mi ŝiris ĉion:
leterojn ciajn, paĝojn cent dek kvar
el ĵuroj, el promes'... kun pli da klar':
perfidojn nur, mensogojn, iluzion.***

***Sed... ploris dum agado! Trovis ion
pledantan por ci tie; kontraŭstar',
kolero malaperis... haltis, ĉar
de nun mi faros kontraŭ ci nenion.***

***Mensogoj nur, mi scias bone... Tamen
la ŝiro de la paĝoj pli detruie
en mia kor' ponardis kaj ponardis.***

***Kaj tial, post momento, surgenue
mi ligis la pecetojn, kaj pli ame
nun gardas ilin ol antaŭe gardis.***

CIAJ LETEROJ

de Humberto de Campos
traduko de Sylla Chaves





Adesão para o ano 2008

Nome _____ CPF _____



Endereço _____

Bairro _____ Tel (____) _____

Cidade / UF _____ CEP _____

Data de Nascimento ____/____/____ Sexo: masc. fem. Profissão _____

Escolaridade: 1º grau 2º grau Superior Curso Técnico _____

Endereço eletrônico _____

Página eletrônica _____

Data: ____/____/2008 _____

Assinatura

L B E - Liga Brasileira de Esperanto

Categoria Membro Individual			R\$
<input type="checkbox"/>	AI	Associado Individual	80,00
<input type="checkbox"/>	AF	Associado Familiar para pais, cônjuges, irmão ou filhos residentes no mesmo endereço que o AI	47,00
<input type="checkbox"/>	AN	Associado Novo permitido por apenas 1 vez e só para quem nunca foi associado da Liga	40,00
<input type="checkbox"/>	AN2	Associado Novo 2 permitido por apenas 1 vez e só para quem é AN	53,00
<input type="checkbox"/>	AN3	Associado Novo 3 permitido por apenas 1 vez e só para quem é AN2	66,00
<input type="checkbox"/>	AC	Associado Colaborador para quem deseja colaborar com mais de R\$ 80,00 (indicar o valor)	
<input type="checkbox"/>	AS	Associado Solidário consultar sua entidade esperantista local	

Categoria Membro Vitalício			R\$
<input type="checkbox"/>	AV	Associado Vitalício (trinta vezes o valor de AI)	2.400,00

Donativos

Despesas gerais da Liga

Fundo Almada - destinado a financiar material promocional em Esperanto como "faldfolioj" etc

Fundo Brazila Esperantisto - fundo para as revistas da BEL

Fundo Congressos - fundo para a realização dos Congressos Brasileiros de Esperanto

Fundo Juventude - destinado a financiar o Concurso Jovem Adido Cultural Brasileiro e outras promoções para o jovem

Fundo Pró Infância - destinado a financiar ações de divulgação do Esperanto entre as crianças como o "Infana Kongreseto"



Atenção: Seu nome e endereço aparecerão no Jarlibro da Liga. Se isso não for do seu desejo, por favor assine a declaração à direita.

NÃO quero que meu nome e endereço apareçam no BEL-Jarlibro

Assinatura

B E J O - Brazila Esperantista Junulara Organizo (Movimento Jovem)

<input type="checkbox"/>	AC	Contribuinte (Só para menores de 30 anos) automaticamente será associado BEL	20,00
<input type="checkbox"/>	AP	Protetor (maiores de 30 anos)	40,00
<input type="checkbox"/>	AB	Benemérito	50,00

U E A - Universal Esperanto-Asocio (Assoc. Mundial de Esperanto)

	não sócio BEL	sócio BEL
<input type="checkbox"/>	MG Recebe apenas o manual sobre o movimento esperantista	17,00 14,00
<input type="checkbox"/>	MJ Recebe o Jarlibro da UEA	41,00 35,00
<input type="checkbox"/>	MJT Só para menores de 30 anos (igual MJ + revista Kontakto+ TEJO-Tutmonde)	41,00 35,00
<input type="checkbox"/>	MA Recebe o Jarlibro da UEA e a revista Esperanto	100,00 84,00
<input type="checkbox"/>	MAT Só para menores de 30 anos (igual MA + revista Kontakto + TEJO-Tutmonde)	100,00 84,00
<input type="checkbox"/>	DM Igual MA toda vida (menor de 30 anos recebe também Kontakto + TEJO-Tutmonde)	2.150,00 2.100,00
<input type="checkbox"/>	DMJ Igual MJ toda vida (menor de 30 anos recebe também Kontakto + TEJO-Tutmonde)	920,00 870,00
<input type="checkbox"/>	SZ Societo Zamenhof (donativo para UEA - não inclui adesão) a partir do dobro do valor para MA	200,00 168,00

(Obs.: Os valores de adesão/donativo para UEA podem sofrer alteração, sem prévio aviso, no caso de variação cambial)

Efetuar o pagamento através de depósito no Banco do Brasil, informando na guia de depósito: agência 0452-9 e conta corrente 402.706-x, ou através de DOC informando 001 para banco destinatário e o CNPJ da Liga 00.406.504/0001-06 (em ambos os casos, anexar cópia do recibo a este formulário), ou através de cartão de crédito VISA, como segue:

nr.: [] [] [] [] [] [] [] [] [] [] [] []
validade: ____/____



Rec n-ro	Total Adesões / donativos
Verso	
	Total a pagar

Assinaturas

Jornais e Revistas

	não sócio BEL	sócio BEL
<input type="checkbox"/> Bulgara Esperantisto - 4x ao ano, 20 pgs, 14,5 x 19,5 cm, p/b (preto e branco), movimento esperantista e assuntos variados	45,00	38,00
<input type="checkbox"/> Dia Regno - 6x ao ano, 24 pgs, 14,7 x 21 cm, p/b, protestantismo e ecumenismo	66,00	55,00
<input type="checkbox"/> Esperanto - 11x ao ano, 24 pgs, 19 x 26,5 cm, cor, revista oficial da Associação Mundial de Esperanto	59,00	49,00
<input type="checkbox"/> Espero Katolika - 6x ao ano, 36 pgs, 17 x 24 cm, cor, catolicismo		
<input type="checkbox"/> via aérea	70,00	58,00
<input type="checkbox"/> via superfície	45,00	38,00
<input type="checkbox"/> Femina - 4x ao ano, 28 pgs, 21 x 29,7 cm, não só para mulheres	97,00	81,00
<input type="checkbox"/> Heroldo de Esperanto - jornal, 17x ao ano, 4 pgs, 29,5 x 41,5 cm, p/b, movimento esperantista		
<input type="checkbox"/> via aérea	174,00	145,00
<input type="checkbox"/> via superfície	125,00	104,00
<input type="checkbox"/> Internacia Pedagogia Revuo - 4x ao ano, 40 pgs, 14,5 x 20,5 cm, p/b, edição da Liga Internacional de Professores de Esperanto	63,00	52,00
<input type="checkbox"/> Israela Esperantisto - 3x ao ano, 22 pgs, 17 x 24 cm, p/b, revista oficial da Liga Israelense de Esperanto	28,00	20,00
<input type="checkbox"/> Juna Amiko - 4x ao ano, 28 pgs, 14,5 x 21 cm, cor, para iniciantes		
<input type="checkbox"/> assinatura única	32,00	27,00
<input type="checkbox"/> assinatura conjunta - Quantidade - a partir de 3, custa cada 20,00 (ou 24,00 - não sócio)		
Obs: (os exemplares de cada conjunto de assinaturas serão remetidos para um só endereço)		
<input type="checkbox"/> Komencanto - boletim, 8x ao ano, 12 pgs, 21 x 29,7 cm, p/b, para autores e esperantistas iniciantes	59,00	49,00
<input type="checkbox"/> Kontakto - 6x ao ano, 16 pgs, 20,5 x 28,5 cm, cor, movimento jovem, revista sócio-cultural da TEJO	35,00	29,00
<input type="checkbox"/> Kosmos - La kosmologio de Martinus - 2x ao ano, 19 pgs, 17,5 x 25 cm, p/b, cosmologia - Martinus Instituto	28,00	23,00
<input type="checkbox"/> La Gazeto - 6x ao ano, 17 x 24,5 cm, p/b, literatura	110,00	91,00
<input type="checkbox"/> La Jaro - 10 x 14,5 cm, p/b, calendário de bolso da revista Monato	31,00	26,00
<input type="checkbox"/> La Kancerkliniko - 5x ao ano, 28 pgs, 21 x 29,7 cm, p/b, humor satírico	66,00	55,00
<input type="checkbox"/> La Ondo de Esperanto - 12x ao ano, 20 pgs, 20,5 x 28,5 cm, p/b, russa, assuntos diversos	87,00	72,00
<input type="checkbox"/> Literatura Foiro - 6x ao ano, 56 pgs, 15 x 21 cm, capa cor, cultura geral, literatura		
<input type="checkbox"/> via aérea	143,00	119,00
<input type="checkbox"/> via superfície	115,00	96,00
<input type="checkbox"/> Litova Stelo - 6x ao ano, 32 pgs, 23 x 16 cm, capa cor, revista oficial da Litova Asocio, movimento esperantista e cultura geral	70,00	58,00
<input type="checkbox"/> Medicina Internacia Revuo - 2x ao ano, 46 pgs, 14 x 21 cm, p/b, revista técnica s/ medicina	70,00	58,00
<input type="checkbox"/> Monato - 12x ao ano, 34 pgs, 21 x 28 cm, capa cor, atualidades mundiais	90,00	75,00
<input type="checkbox"/> Oomoto Internacia - 4x ao ano, 24 pgs, 18,5 x 26 cm, em cores, revista da organização religiosa Oomoto	40,00	40,00
<input type="checkbox"/> Scienca Revuo - 4x ao ano, 54 pgs, 14,5 x 21 cm, p/b, assuntos científicos	70,00	58,00
<input type="checkbox"/> Scienca kaj kulturo - 6x ao ano, 48 pgs, 14,5 x 21 cm, capa cor, russa	104,00	87,00
<input type="checkbox"/> Simpozio - 2x ao ano, 56 pgs, 14,5 x 21,5 cm, p/b, assuntos filosóficos, Associação Mundial de Filosofia	8,00	8,00
<input type="checkbox"/> Tejo-Tutmonde - 4x ao ano, 36 pgs, 14,5 x 20,5 cm, p/b, revista oficial da Organização Mundial da Juventude Esperantista	17,00	14,00

Transcreva o total para o anverso

IMPORTANTE:

- Se você está ficando sócio da Liga agora, já tem direito aos preços reduzidos, indicados na coluna "sócio BEL";
- A Liga responsabiliza-se tão somente pela intermediação dos pedidos de assinatura e repasse dos respectivos valores. Qualquer atraso ou não remessa da publicação é de inteira responsabilidade do(s) editor(es);
- Mudança de endereço deve ser comunicada pelo assinante diretamente ao(s) editor(es);
- Os valores podem sofrer alterações, sem prévio aviso, no caso de variação cambial expressiva.
- A maioria dos periódicos é de frequência anual. Se você faz uma assinatura em setembro, por exemplo, receberá os números atrasados, ou seja, de janeiro a agosto, (se ainda não esgotados) juntamente com o de setembro. Por isso, é aconselhável não assinar periódicos nos últimos meses do ano, mas sim aguardar o formulário de assinatura para o ano seguinte, o qual é normalmente distribuído pela Liga em outubro.



LIBROSERVO
Brazila Esperanto-Ligo

Liga Brasileira de Esperanto

MENU PRINCIPAL

- LibroServo
- BEL

USUÁRIO - ENTRADA

Nome de Usuário

Senha

Lembrar de mim

Entrar

Esqueceu sua senha?
Sem conta? Crie uma

CATEGORIAS

- Dicion. & Linguísticos (8)
- Didáticos (15)
- Especializados (8)
- Romances (27)
- Teatro e Poesia (7)
- Áudio e Vídeo (5)
- Religiosos (4)
- Diversos (8)

Todos os Produtos

Esperantista de coração

LibroServo • LibroServo

CATEGORIAS

- HEIMA Vektoro
- Esperanto
- AVARA ROMANARO
- Dico BERTILO
- Dicion. & Linguísticos (8)
- Didáticos (15)
- Especializados (8)
- Romances (27)
- Teatro e Poesia (7)
- Áudio e Vídeo (5)
- Religiosos (4)
- Diversos (8)

Brazila Esperanto-Ligo



Aliĝu al BEL

(Vidu aliĝilon sur paĝo 22)

Brazilei

ĵaro 2 n-ro 5 2007



Brazilei unujara!!!

Porinstruista revuo
eldonata de
Brazila Sekcio de ILEI



www.ileibe.org



Altnivelaj ĉemizoj je via dispono

Amarílio Hevia de Carvalho
Caixa Postal 246
78600-000 Barra do Garças - MT
Tel. (66) 3401-5203 [21-23h]
amarilio@araguaia.net

Atenton! Bonvolu pagi per ĉeko de via
banko aŭ deponi la monon:
Banco do Brasil 9.810-8 / AG. 0571-1

www.araguaia.net/amarilio

**Esperanta Klubo
Zamehof**

59-jara!

*Venu
kunfesti*

La 25-an de januaro 2008 ★
Rua Idioma Esperanto, 363
São Miguel Paulista, São Paulo/SP
Tel. (11) 6297-1400



Brazila Esperanta Parnaso
16x23cm - 288p



Organizintoj:
Sylla Chaves
Neide Barros Rêgo

Poesias escolhidaj de
Brazila Esperanta
Parnaso [dulingve]
16x23cm, 192p

Nemalhaveblaj!

neide.barros@terra.com.br

**Paulo Sérgio
Viana**



Regalas nin per sia
plej freŝa traduko
de *Dom Casmurro*
kaj per sia originale
verkita porinfana
libro *Breno kaj
Bruno*



Impona!

*Majstroverko de
Machado de Assis en
esperanta traduko de
Paulo Sérgio Viana*

Formato: 12 x 20 cm
272 paĝoj kudre binditaj
Prezo: R\$ 25,00

Ĉarma!



Originale verkita
32 paĝoj kolore ilustritaj
Formato: 20 x 15 cm - Prezo: R\$ 15,00

www.ileibr.org/butiko

Prof. José Passini

**La modernaj tempoj postulas
pli realisman argumentadon
pri la tutmonda lingva politiko**

Bone informitaj esperantistoj
legas bonajn verkojn

En preparo la 3-a pliampleksigita eldono de
Bilingüismo: utopia ou antibabel?



Lanĉota venantjare
en la 43-a BKE!